

Pugnobataloj - ĝismortaj, sed amikecaj



20 homoj mortigitaj kaj
69 aliaj vunditaj en
atako en libia
aerodromo

Alpoj: migrantoj en
danĝero: «Ni timas, ke
okazos mortoj»

Ĉefo de UN kondamnas
sinmortigajn atakojn
en Bagdado

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Alpoj: migrantoj en danĝero: «Ni timas, ke okazos mortoj»

Minus 8 gradoj p. 03

Ĉefo de UN kondamnas sinmortigajn atakojn en Bagdado

Du bombatakoj p. 04

20 homoj mortigitaj kaj 69 aliaj vunditaj en atako en libia aerodromo

En la libia ĉefurbo Tripolo p. 04

Centra Komitato de Palestina Liberiga Organizo ĉesis agnoski Israelon

Fondi la palestinan ŝtaton kun plena suvereneco p. 05

Pugnobataloj – ĝismortaj, sed amikecaj

Tradicia rusa luktosporto p. 06

Hodiaŭe

Pedro Calderón de LA BARCA; kaj Tula p. 08



Alpoj: migrantoj en danĝero: «Ni timas, ke okazos mortoj»

20 kilometrojn for de Briansono, ĉe la itala landlimo, francaj volontuloj helpas migrantojn, kiuj trapasas Alpojn.

Ni ne devas altiri la atenton de la ĝendarmoj, ĉar la franca leĝo malpermesas ĉian helpon pri trapaso de la landlimo.

«Venu, ni havas manĝaĵon, teon, ne timu!» krias la volontulo en la nokto, kiam li renkontas migranton.

De kvin horoj, kvar viroj el Okcidenta Afriko paŝas en la mallumo, en minus 8 gradoj, kun frostigitaj manoj.

«Ĉu vi povas helpi nin akiri gantojn?», demandas iu el ili. La volontuloj serĉas gantojn en la kofro de sia veturilo.

Same kiel ili, dum la lastaj kvar monatoj, 1 600 migrantoj provis trapasi la Alpojn sude

de Francio.

En tiu danĝera irvojo, Mamadou BAM riskis sian vivon en marto 2016. Liaj piedoj frostiĝis, li nun estas en reedukado en Briansono, post duobla amputado.

«Ni estis blokitaĵ, ĉar la neĝo estis tro abunda, rakontas Maliano, ni povis nek antaŭenpaŝi, nek retropaŝi, ni plu havis neniun solvon. Mi plurfoje provis stariĝi, falis plurfoje, mi estis frostigita ĝis la genuoj, mi plu sentis nenion. Mi ne sciis, ke la neĝo brulvundas».


Mamadou BAM ne povas restadi staranta dum pli ol du horoj.

Jean Paul BOREL provis savi virojn kiel li. Tiu loĝanto de la regiono estis arestita de la ĝendarmoj, dum li kondukis kvar migrantojn en urĝa akceptejo en Briansono. Kaj li timas dramon: «La migrantoj pli kaj pli riskas sian vivon por trapasi, kaj laŭ mi, se tiu situacio daŭras ĉi-vintre, mortoj okazos en la Briansona regiono».

Neniam Milito Inter Ni

Ĉefo de UN kondamnas sinmortigajn atakojn en Bagdado

Stephane DUJARRIC, proparolanto de Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António GUTERRES, diris, ke la ĝenerala sekretario kondamnas per la plej fortaj esprimoj la lundajn terorismajn atakojn en la iraka ĉefurbo Bagdado.



familioj de la viktimoj kaj deziras rapidan resaniĝon al la vunditoj.

GUTERRES reasertis, ke UN subtenos plu la registaron kaj popolon de Irako en iliaj klopodoj kontraŭbatali terorismon kaj rekonstrui la landon.

Du bombatakoj dum kelkaj minutoj skuis subĉielan bazaron en Bagdado, mortigante pli ol 20 homojn lunde [15 jan 2018] frumatene.

La proparolanto diris, ke GUTERRES esprimas siajn plej profundajn simpatiojn al la

Yu
Ĉina Radio Internacia

20 homoj mortigitaj kaj 69 aliaj vunditaj en atako en libia aerodromo

Informita persono el la libia medicina departemento konfirmis lunde [15 jan 2018], ke 20 homoj estis mortigitaj kaj 69 aliaj vunditaj tiutage en atako en la internacia flughaveno en la libia ĉefurbo Tripolo.




La speciala trupo sub la Ministerio de Internaj Aferoj, kiu respondacas pri la sekureco de la flughaveno, publikigis deklaron, dirante, ke la milico *Bashir al-Baqarah* lanĉis la atakon. Fotoj publikigitaj de la speciala trupo montris, ke multaj tankoj kaj blenditaj aŭtoj estas aranĝitaj en

la regionoj ĉirkaŭ la flughaveno, kaj densa fumo leviĝas.

Direktoro de la tripola kampa hospitalo diris al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke 20 homoj estis mortigitaj kaj 69 aliaj vunditaj en la konflikto, kaj inter ili estis civiluloj. Li aldonis, ke la nombro de mortintoj kaj vunditoj eble kreskos.

La libia civil-aviada administracio diris, ke 5 aviadiloj parkitaj en la flughaveno estis grave difektitaj, kaj la flughaveno restas fermita pro la daŭranta konflikto.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Centra Komitato de Palestina Liberiga Organizo ĉesis agnoski Israelon

Lunde [15 jan 2018] vespere en la urbo *Ramallah* en Cisjordanio, fermiĝis la 28-a kunveno de la Centra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo. Deklaro publikigita post la kunveno eksplikis la freŝajn starpunktojn de Palestino pri Usono, Israelo kaj la procezo de palestina-israela paco kaj anoncis ke ĝi ĉesigas la agnoskon de Israelo.

La du-taga kunveno, kun la temo "Jerusalemo estas la ĉiama ĉefurbo de la palestina ŝtato", estis okazigita laŭ la urĝa peto de Palestina Prezidento Mahmoud ABBAS.

Salim ZANOUN, prezidanto de la Palestina Nacia Konsilio kaj prezidanto de la Centra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo, voĉlegis la deklaron. Pri la rilatoj kun Usono, la deklaro kondamnis kaj rifuzis la

lastmonatan decidon de usona prezidento Donald TRUMP, kiu agnoskas Jerusalemon kiel la ĉefurbon de Israelo. La deklaro diris, ke Usono jam perdis sian kvalifikon kiel mediacianto pri palestina-israela paco. Ĝi aldonis, ke Usono povos esti partnero de la paca procezo, nur kiam ĝi retiros la decidon de TRUMP pri Jerusalemo.

La deklaro diris, ke ĉar Israelo jam ĉesis efektivigi interkonsentojn subskribitajn kun Palestino, la Centra Komitato de la Palestina Liberiga Organizo klopodos por realigi sendependecon de Palestino, la transiron de aŭtonoma reĝimo al sendependa ŝtato kaj fondi la palestinan ŝtaton kun plena suvereneco kaj kun Orient-Jerusalemo kiel la ĉefurbo surbaze de la landlimo de 1967. La deklaro komisiis al la Plenuma Komitato de la Palestina Liberiga Organizo ĉesigi la agnoskon de Israelo, ĝis ĝi aknoskos la palestinan ŝtaton fonditan surbaze de la landlimo de 1967, nuligos la decidon pri aneksado de Orient-Jerusalemo kaj haltigos konstruadon de judaj setlejoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Pugnobataloj – ĝismortaj, sed amikecaj

Tiu tradicia rusa luktoŝporto havas plurajn nomojn eksterlande. En la hispana vikipedio oni transliterigas *Kulachniy boy* [kulaĉnij boj] (Pugna batalo) dum en la angla kaj la franca oni preferis tradukaĵon *Russian boxing*. Mi elektis mezan vojon kaj uzos esperanto-tradukon proksiman al la originalo – pugnolukto. Malgraŭ populara opinio, tio estis ne banala interbatiĝo, sed specifa subkulturo kun siaj ĥierarĥio kaj reguloj. Mi rakontos pri ĝia loka variaĵo – la pugnobatalantoj okazintaj antaŭ jarcento en la siberia urbo Tjumeno.



Batemuloj el slumoj

Pugnobatalojn partoprenis la tutaj kvartaloj. Ofte ili dum jaroj okazis en la samaj lokoj – sur la glacikovrita rivero Tura, apud fervoja stacidomo, akvoturo ktp. La ĉefaj iniciatintoj estis pugnoluktaj teamoj (oni nomis ilin *artel'*), kiujn tjumenanoj nomis parizanoj, *busarga* aŭ simple varmaj buboj. Kial la parizanoj? Eble oni ankoraŭ ne forgesis la Parizan Komunumon de 1871, kiam ribelis la parizaj malaltklasanoj aŭ lokaj batemuloj simple ŝatis melodion Parizanino.

Ĉiu teamo kontrolis sian urboparton kaj severe punis fremdulojn, kiuj aŭdacis trapasi ĝiajn limojn. Estro de la teamo nomiĝis atamano (aliaj nomoj – ĉevalbredisto, *baŝlik*, iniciatinto). Veran nomon de la atamano kutime anstataŭis kromnomo – Arkadĉjo-Strekulist, Kolĉjo-

Virkoketo, Vanĉjo-Kaino ktp. Li aprobis aniĝon de novaj luktantoj, juĝis kulpulojn kaj gvidis la batalon. Se dum batalo la atamano ĵetis ĉapon surteren antaŭ si, tio signifis ordonon: stari ĝismorte. "Atamano forprenis grizan ĉapon – metis ĝin sur vojon – Elpoŝigis tranĉilon – kaj diris: ni ne forkuros".

Kutime atamano havis du-tri asistantojn (unu el ili nomiĝis *jesaŭl*, kio estis suboficira rango en kozakaj trupoj), sed la ĉefa batalpovo estis la malnovaj batalantoj (ankaŭ nomataj la enskribitoj). Aliaj teamanoj nomiĝis *rjadoviĉi* (ordinaruloj) kaj dum batalo devis ŝirmi la atamanon kaj la enskribitojn.

Aparte staris incituloj (komenculoj, fajriguloj) kiujn famigis ĉefe ne fortaj pugnoj, sed pika lango. Antaŭ la batalo "muro kontraŭ muron" ili eliris la unuaj, kun speciale preparitaj rikanaĵoj, incitaj kantetoj (*ĉastuŝka*) aŭ simple akraj vortoj por inciti kaj moki la kontraŭan teamon.

Specialan rolon ludis harmonikisto [ludanto de rusa akordiono/tirharmoniko] – li estis kvazaŭ batalstandardo de teamo, protektenda fierindaĵo. Antaŭ batalo li ekludis melodiojn je specifa maniero kun ululado kaj jelpado, do eĉ pro normala melodio kiel Saratovo aŭ Parizanino ekbolis sango en la vejnoj de la batalantoj.

Tjumena pugnoluktisto videblis de malproksime: grandega ŝaravaro, galoŝoj sur la nudaj piedoj, kepo kun plasta nigra beko, ĉemizo kun kolumo ĝis oreloj kaj super ĝi jako, metita sur unu brakon. Ĉio ĉi estis ne

nura fanfaraĵo, sed ankaŭ malnova kaj tute praktika tradicio. Vasta pantalono ebligis liberajn piedbatojn. Galoŝoj aŭ altaj botoj ŝirmis piedojn kaj tibiojn kontraŭ battoj kaj ofte kaŝis ĉe interna flanko tranĉilon. Se polico haltigis tian batemulon li kutime prezentis sin ŝuisto, do tranĉilo aŭ aleno en boto estis nuraj laboriloj. “En *Sarai* ĉiuj estas ŝuistoj” ironie rimarkigis loka ĵurnalo en 1925.



Sarai (Tenejoj) estis bandita nesto rande de Tjumen, kie oni fabrikis brikojn sekigatajn en multnombraj tenejoj. Tiu laboro estis malfacilega, do altiris ĉefe hieraŭajn kamparanojn, vagabondojn kaj krimulojn, ĉar la dungantoj ne tre zorgis pri dokumentoj de siaj laboristoj.

En la jakon oni kutime metis nur la maldekstran brakon por lasi la dekstran libera. La maldekstra maniko protektis la brakon kontraŭ battoj per bastono aŭ tranĉilo por kio oni aplikis specialajn teknikojn. Sperta parizanino povis laŭ vestoj difini humoron de la kontraŭulo. Ekzemple jako, metita sur unu brakon signifis defion, pretecon al batalo. Eĉ pli alta aŭdaco estis meti jakon sur ŝultrojn sen enigi la brakojn en manikojn – tio deklaris disdegnon al danĝero. Kaj inverse – se la bubo prenis jakon ĉe kolumo kaj metis trans la ŝultron, ĉiuj komprenis ke li deziras trankvile foriri, sen partopreni la batalon kaj tio estis lia rajto. La sama jako metita super la ŝultrojn de junulino signifis, ke nun ŝi estas okupita, do amindumi ŝin eblos nur post ŝia disiĝo kun la nuna koramiko.

Ankaŭ kepo povis multon rakonti pri sia posedanto. Tiu ŝovita sur la okulojn diris pri

nervoza stato de la bubo kaj forta maldeziro batali, do fakte minacis: “Ne tuŝu min aŭ mi ponardos”. La sama kepo ŝovita malantaŭen, al la nuko, anoncis tute kontraŭan, bataleman humoron. Iuj

esploristoj opinias ke la maniero surporti ĉapon oblikvoflanke devenas de iamaj ĉevalrajdistaj bataloj, kiam la normale metita ĉapo povus malutili al svingado de sabro super la kapo. Tio sonas kredeble, ĉar pugnolukto same kiel armila batalo havis siajn regulojn, kiujn strikte sekvis ne nur batemuloj el *Sarai*, sed ankaŭ pacaj filisteroj kies batalema spirito vekigis nur en tiuj tagoj.

Donu batalon!

Je destinita tago la plej fervoraj luktantoj kun harmonikisto trairis sian kvartalon, kunvokante kamaradojn. Al la batalejo oni iris grupe, kantante al la harmoniko incitajn kanzonetojn. La unuaj sur batalkampon elkuris etuloj-fajriguloj, 7 ĝis 12 jarojn aĝaj, kiuj kun krio “Donu batalon!” sin ĵetis kontraŭ malamika muro. La atamanoj incitis ilin, kunigante en densan amason dum aliaj batalantoj emociigis ĝis maksimume batalema stato. Poste komenciĝis totala batalo, kiu finiĝis per fuĝo de unu flanko, persekutata de la venkintoj.

La tjumena negocisto Nikolao ĈUKMALDIN rememoris en 1863 ke fojfoje samtempe okazis kelkaj antaŭaj interpuŝiĝoj kaj nur en krepusko komenciĝis vera batalo kun

partopreno de plenkreskaj luktantoj. En amasaj tumultoj, aranĝataj sur glacio de la rivero *Tura*, renkontiĝis ĝis 500-600 viroj. Laŭ atestoj de samtempuloj, ili luktis kruele, arde, verve. Kutime jam post duonhoru unu el la flankoj trabatis la muron el kontraŭuloj kaj postkurigis la venkitojn.

La scenon observis multnombraj spektantoj, inter kiuj estis famaj komercistoj, patroj de la urbo. La ĝismorta batalo fajrigis ilian sangon, do la korpulentaj, respektataj viroj tremis pro ekscitiĝo, stamfis kaj snufis, kriante: “Batu la niaj, batu! 25 rublojn por vodko! Sitelon da vodko!” Cetere temis ĉefe pri la sporta, konkura ekscitiĝo, ja neniu vere koleris kontraŭ la malamiko. Nikolao ĈUKMALDIN rimarkigis, ke post batalo la venkintoj kaj la venkitoj pace festenis kune, verve promesante unu al alia ke ja sekvan fojon ili nepre...

Lokaj aŭtoritatoj kompreneme rilatis al la pugnobataloj, nemalofte la policistoj mem

partoprenis aŭ almenaŭ ĉeestis ilin kiel observantoj. Sporadaj provoj elradikigi la tradicion tute fiaskis. En 1863 tjumena poliestro postulis de la batalantoj disiri, sed responde aŭdiĝis: “Foriru, via moŝto, tio ja venas de niaj praavoj” – kaj li prudente sekvis la sugeston. Duonjarcenton poste polico verŝis sur batalantojn glacian akvon el fajrobrigada tubo, sed same senrezulte.

Eĉ la sovetia potenco dum longa tempo ne povis ĉesigi la popolan batalemon. Kiam en 1923 la milico [polico] detenis partoprenantojn de pugnobatalo, tiuj klarigis sian konduton laŭe al la epoko: “Ni okupiĝas pri fizika kulturo, iĝis sportistoj kaj trovas en tio grandan feliĉon!” Malnovaj tjumenanoj rememoras ke la lasta pugnobatalo, en kiu partoprenis nur 20 batalantoj, okazis en *Sarai* en 1946.

Stano BELOV
stanobelov.blogspot.com



Pedro Calderón de LA BARCA

Pedro Calderón de LA BARCA (elp. **PE**dرو **kalde**RON de la **BAR**ka) (Madrido, 17-a de januaro 1600 - 25-a de majo 1681) estis hispana poeto kaj dramisto. Unu el la ĉefaj aŭtoroj de la Hispana ora epoko en beletro, kun Miguel de CERVANTES kaj Lope de VEGA.

Vikimedia



Bildo de la tago

Tula virino vendas teksaĵojn en Panamurbo.

Vikimedia